

O BRASIL — ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.

NOVA FASE DO, "BRAZILA ESPERANTISTO"

ANO 42 — N.º 130 — 132 (416 - 418)

Telegrafa adreso: ESPERANTOLIGO

OUTUBRO — DEZEMBRO, 1948

Diretor: A. Caetano Coutinho
Redator responsável:
Dr. Carlos Domingues
Telefone — 42-4357

Administração e redação:
Praça da República, 54-sob.
Rio de Janeiro — Brasil

Gratuito para os sócios da Liga
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15
respondkuponoj.

ESPERANTO ĈE LA PRALOGANTOJ DE BRAZILIO

En la sidejo de Brazila Ligo Esperantista, S-ro Tibor Sekelj faris interesan paroladon kun lumbildoj pri liaj esploroj ĉe diversaj triboj indiĝenaj de Teritorio Guaporé, en Brazilo. Ĉiuj tri sciencistoj en tiu ekskurso estas esperantistoj, nome geedzoj Sekelj kaj D-rino Rosa Skolnik, el Córdoba, Argentino.

La indiĝenoj tre facile lernas kantojn, kaj tial niaj samideanoj instruis al ili Esperantajn kantojn, kiujn ili tute ne komprenas, sed bele kantas. Tiuj triboj estas eltrovitaj nur nun de la kuraĝaj esploristoj, ĉar vojaĝo al tiu regiono estas tre malfacila; tamen, aliaj esploristoj iam retrovos la samajn tribojn kaj konstatos kun miro, ke tie oni bele kantas en Esperanto.

La scienca parolado de Samideano Sekelj pri la moroj kaj kutimoj de tiuj indiĝenoj vekis grandan intereson kaj montris, ke kelkaj kuracistaj kaj religiaj agoj de eŭropanoj estas uzataj ankaŭ de necivilizitaj prahomoj, ekzemple: iliaj sorĉistoj konas kaj uzas magnetismon en la kuracado de malsanoj, tute simile je kelkaj eŭropaj skoloj, ĉefe tiu de Mesmer.

Ili praktikas ankaŭ spiritismon kiel religion kaj kuracarton, certe ne tute same kiel la eŭropanoj Allan Kardec kaj Conan Doyle, tamen, fundamente, la principoj estas identaj: ili alvokas la Spiritojn de la mortintoj de la tribo kaj kredas, ke tiuj Spiritoj venas al ili kaj provizore enkarniĝas en iliajn sorĉistojn; la sorĉisto funkcias do kiel la mediumoj en la civilizita mondo. Simile al ŝintoistoj, tiuj indiĝenoj kredas, ke iliaj prapatroj loĝas ĉiam en la tribo kaj estas hejmaj dioj. Tiu primitiva adorado al hejmaj dioj, estas pli precize la kredo de la nuntempaj ŝintoistaj japanoj, sed ankaŭ iel simila al la religio de la anti-

kvaj romanoj, kiuj kredis je siaj hejmaj dioj, kiujn ili nomadis "manes".

De tempo al tempo ili invitas siajn mortintojn al bankedoj. Dum tuta monato ili ĉesas kaj preparas viandon por la festeno en difinita nokto en lunlumo. Tiam ĉiuj viroj de la tribo kunvenas kaj kantas kantojn por altiri la Spiritojn de la tribanoj, kiuj efektive alvenas, laŭ ilia konvinko, kaj enkorpigas en la virojn por manĝi la viandon.

Iel simile al la Romkatolika Eklezio, en kiu nur viroj povas sacerdotiĝi, ankaŭ ĉe la indiĝenoj nur viroj rajtas partopreni en religiaj ceremonioj; virino ne povas esti sorĉistino. Ĉirilate iliaj kredoj neniel similas spiritismon kaj



Tibor Sekelj kun sorĉisto el la tribo Tupari, el la regiono de Guaporé

teozofion, ĉar en tiuj ĉi movadoj virino estas egalrajta kiel viro.

Tiuj indiĝenoj loĝas en domegoj nomataj "malokaj" kaj uzas nenian veston; nur kelkajn ornamaĵojn kaj pentraĵojn ili portas sur la bruna korpo.

Ilia geedziĝo estas mirinde simpla: se la ĉefsorĉisto kaj la gepatroj de junulino ne kontraŭstaras, la fianĉo, sin provizinte je multaj sagoj, prenas ŝin por longa ekskurso en la praarbaro. Tie la juna paro pasigas tutajn semajnojn en "mieltempo", kaj, reveninte en la tribon, ili estas konsiderataj geedzoj. Ordinare la popolo estas monogama, sed la tribestroj kaj ĉefsorĉistoj havas pli ol unu edzinon.

Pri tiu esplorado S-ro Sekelj preparas gravan sciencon verkon en hispana lingvo. Baldaŭ niaj scivolemaj samideanoj havos riĉan materialon.

NACIA KONSILANTARO DE STATISTIKO

Rezolucio n.º 400 de la 22-a de Julio 1948

La Nacia Konsilantaro de Statistiko, en sia ĝenerala kunveno je la 22-a de Julio 1948, krom aliaj konsideradoj:

Konsiderante ke — la adopto de internacia helplingvo facile lernebla estas unu el la rimedoj por forigi la miskomprenojn inter la popoloj, kaj garanti al la konstruaj idealoj rapidan plenan kaj efikan disvastiĝon; ke la internacia uzado de neŭtrala idioma faciligos la rilatojn ekonomiajn, kulturajn kaj eĉ politikajn inter ĉiuj Nacioj, kaj ankaŭ forte kontribuos al la popola edukado, decidis:

Par. 1-a — Estas aprobitaj deziresprimoj pri laŭdo kaj pri danko al Ministerio por Eksterlandaj Aferoj, pro ĝia agado favore al plena integreco de Brazilo al la sistemo kaj altaj celoj de UNESCO, kaj pro la faritaj klopodoj

(Daŭrigas sur paĝo 2)

Imitado de Kristo

Libro I — Ĉapitro I

Pri imitado de Kristo kaj malŝato de ĉiuj mondaj vantaĵoj

**Kiu min sekvas,
tiu ne iros en mallumo** (Jo. 8,12),
diras la Sinjoro.

Jen la vortoj de Kristo,
per kiuj ni estas admonataj
ke ni imitu lian vivon kaj morojn,
se ni deziras vereme lumiĝi
kaj de ĉiu korblindeco liberigi (Mk. 3,5).

Estu do nia plej alta studo:
meditadi pri la vivo de Jesuo Kristo
superas ĉiujn doktrinojn de sanktuloj:
kiu havas la spiriton,
tiu eltrovas tie la **kaŝitan manaon** (Apok.
2, 17).

Sed okazas
ke multaj
pro aŭdado ofta de l'Evangelio
sentas malgrandan deziron,
ĉar ili ne havas la spiriton de Kristo
(Rom. 8, 9).

Sed kiu volas
plene kaj bonguste elkompreni
la vortojn de Kristo,
tiu klopodserĉu
laŭigi al li sian tutan vivon.

Kion al vi utilis
profundege disputadi
pri Triunua mistero,
se al vi mankus humileco
kaj tiel vi malplaĉus
al la sama Triunuo?

Vere estas ke
ne profundserĉaj vortoj
sanktigas kaj justigas homon;
sed laŭvira vivado
faros vin estimata de Dio.

Mi preferas senti pekpenton
ol scipovi ĝian difinon.

Se vi konpovus parkere
la tutan Biblion
kaj la sentencojn de ĉiuj filozofoj,
kion utilis ĉio tio
sen dia amo kaj graco?

**Vantaĵo de vantaĵoj,
ĉio estas vantaĵo** (Pred. 1, 2),
krom la amo al Dio
kaj la servado al li sola (Read. 6, 13;
10, 20; Mt 4, 10; Lk 4,8)

Jen la plej alta saĝeco:
per malŝato de la mondo
iradi al la ĉiela regno.

Vantaĵo do estas

serĉadi pereontan riĉon
kaj sur ĝi apogi sian esperon.

Vantaĵo ankaŭ estas
honorajn ambicij
kaj leviĝi en altan staton.

Vantaĵo estas
postsekvi la dezirojn de la karno (Gal.
5, 16)

kaj deziregi tion,
pro kio
oni estas poste severe punota.

Vantaĵo estas
longan vivon deziradi
kaj pri bona vivo malzorgi.

Vantaĵo estas
atenti nur la nunan vivon
kaj pri la estonta neniel antaŭzorgi

Vantaĵo estas
ami tion,
kio pasas kurante,
kie daŭras eterna ĝojo.
kaj ne rapidi tien,

Tiun proverbon ofte memoru:
**Ne satigas la okulo de vidado,
kaj ne pleniĝas la orelo de aŭdado** (Pred
1, 8).

Klopodu
eltiri vian koron
de la amo al videblaĵoj
kaj translokiĝi
al la regiono de nevideblo.

Ĉar tiuj,
kiuj sekvas sian sentamon,
makulas la konsciencan
kaj perdas la gracon de Dio.

Trad. Pastro J. Nogueira Machado, S. J.

GRAVA POLITIKA PARTIO

APROBAS ESPERANTON

En sia tutlanda Kongreso, en Okto-
bro de la kuranta jaro, la malnova bra-
zila "Respublika Partio" aprobis propo-
non favoran al Esperanto, verkitan de
nia eminenta samideano D-ro Miguel
Timponi, Prezidanto de la Fako de la
Partio en Federacia Distrikto kaj sub-
skribitan de la tuta Faka Direktoraro.

Laŭ tiu unuanime aprobita propo-
no, la Partio esploras la ebleron enkon-
duki la instruadon de Esperanto en la
lernejojn, okaze de la reformo de la pu-
blika instruado, kaj tial sendis la pro-
ponon al sia reprezentantaro en la bra-
zila tutlanda Parlamento.

Tiu fama Partio estas fondita en
la 18-a de Aprilo 1873, per aliĝo de la
tiamaj respublikaj kluboj, kiuj batalis
kontraŭ la Imperio, kiun ĝi finfine fali-
gis en la 15-a de Novembro 1889. Ĉia
unuatempa batalado estis kontraŭ skla-

veco kaj la reĝimo ĝin tenanta en la lan-
do. En la 13-a de Majo 1888 la sklaveco
estis aboliciita fare de la Imperio mem,
per Dekreto subskribita de kronprincino
Isabel, dum ŝia patro, Imperiestro Pe-
tro II-a, vojaĝis eksterlande kaj ŝi estis
provizora regantino de la Imperio. En la
sekvinta jaro la propagando farata de
Respublika Partio pace faligis la Impe-
rion kaj starigis nian Respublikon.

La venkoj de tiu grava Partio skri-
bis en Brazilo la Historion de nia Res-
publiko. La domo, en kiu fondiĝis la
Partio, fariĝis Muzeo, kiu ricevis la no-
mon "Museu Republicano" (Respublika
Muzeo), en Itu, ŝtato S. Paŭlo.

Kompreneble, de kiam la Partio fa-
riĝis reganta forto, ĝi iom post iom per-
dis sian revolucieman karakteron kaj
fariĝis konservativa partio. Nun ĝi estas
ja ankoraŭ konservativa, tradicia, sed
progresema, kaj ĝia aprobo al la afero
Esperanto estas tre grava paŝo.

La nunjara Kongreso de la Partio
efektivigis en la Ĉefurbo de Minas Ge-
rais, Belo Horizonte, kie kunvenis parti-
taj delegitaroj el ĉiuj ŝtatoj de Brazilo
kaj el Federacia Distrikto. La propono
por Esperanto estis parole defendita de
Inĝ. Lauro Timponi, filo de la redaktin-
to, kaj entuziasme unuanime aprobita
de la delegitaroj.

PETIÇÃO AS NAÇÕES UNIDAS

Até 1 de Dezembro deste ano, a
petição que será apresentada às Nações
Unidas, em favor do Esperanto, conta-
va 9.829.070 signatários.

Dêsses declarantes 220.276 eram do
Brasil, que se achava então colocado no
6.º lugar entre cerca de 40 países.

Renovamos aqui os nossos agrade-
cimentos aos grupos e sócios que nos
auxiliaram na colecta de declarações.

(Fino de paĝo 1)

por ke nia lando reprezentu sin indece
ĉe pluraj specialigitaj komisionoj de la
Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de
UNO.

Par. 2-a — La Konsilantaro denove
esprimas la manifestadon de sia fido,
jam esprimita je aliaj okazoj, al servoj
kiujn liveras Esperanto al idealo pri re-
ciproka interkompreniĝo de la popoloj,
kaj formulas deziron ke UNO utiligu,
en siaj laboroj kaj publikaĵoj, tiun bo-
negan ilon por la intelektaj kunlaboroj,
tiel faciligante la finan venkon de la
helplingvo, kun profito de la harmonia
vivado kaj universala kulturo de la po-
poloj.

CONCURSO

Damos abaixo o resultado do concurso de tradução, aberto por êste órgão, de trecho da conferência "Esperança", feita por Olavo Bilac.

A Comissão julgadora, composta de Dr. L. Porto Carreiro, Dr. J. B. Mello e Souza e A. Caetano Coutinho, depois do exame dos trabalhos apresentados, classificou as três melhores traduções:

- 1.º lugar — tradução de Ahasverus
- 2.º lugar — tradução de Marta Soffer
- 3.º lugar — tradução de Mischk.

Abertos os envelopes que continham os nomes dos concorrentes, verificou-se que pertenciam os três pseudônimos, respectivamente, aos samideanos Paulo de Oliveira Ludka (Niterói); Diva Jaime Costa (Belo-Horizonte); Mister Black Moreira (Pitangui, Minas-Gerais).

De conformidade com as condições do concurso, cada um dos três classificados recebeu um livro, cabendo La Faraono, de Prus, traduzido por Kabe, ao primeiro classificado, Efigenio en Taŭrido, de Goethe, traduzido por L. L. Zamenhof ao segundo e Hamleto de Shakespeare, traduzido por L. L. Zamenhof, ao terceiro.

Eis a tradução classificada em primeiro lugar, com ligeiras correções, que a comissão julgou conveniente fazer, sem de modo algum atingir o mérito do trabalho:

Espero (Olavo Bilac)

La Biblio ne estas la libro de iu religio: ĝi estas la simbola libro de la tuta antikveco. Ĉiu el ĝiaj paragrafoj estas simbolo, kiu havas unu evidentan serĉon kaj duan sencion, kiun oni devas eltrovi kaj interpreti. Memoru la epizodon pri la korvo kaj la kolombo, en la tago, kiam ĉesis la diluvo...

La arĝeo estis haltinta. La akvo apenaŭ ekmalaltigis. Ankoraŭ ne aperis la suproj de la montoj. La vastega akvotuko mortevolvis la teron. Ekstis la deka monato de la diluvo.

Noa, malpacienca — kaj estas neniu, kiu ne komprenus tian malpaciencon, ĉar ne estas agrable vivadi dum dek monatoj, en ŝipo malbone konstruita, meze en dezerta oceano kaj kunvivante kun ĉiaspecaj bestoj! — Noa, malpacienca, malfermis la fenestron kaj liberigis korvon. La korvo ne revenis. La izolito, tiam, liberigis kolombon, kiu etendis la flugilojn, ekflugis, malaperis kaj baldaŭ revenis, spireganta kaj laca, ne trovinte lokon por ŝidiĝi. Noa lasis

ĝin ripozi sep tagojn — pliajn sep tagojn da espero! — kaj liberigis ĝin de nove. Kaj, tiun fojon, ĝi revenis, kunportante en la beko la verdan branĉon de olivarbo, la esperkoloran branĉon...

Trad. Paulo de Oliveira Ludka.

D-RO L. L. ZAMENHOF

La brazilaj esperantistoj ne forgesas celebri ĉiujare la datrevenon de la naskiĝo de nia Majstro.

Memorige de la 89-a datreveno, PRA-2, la radiostacio de Ministerio de Edukado kaj Saneco dissendis en sia ĉiulunda programo "Ĝuste mondo maravilha" (Tiu mirinda mondo), kiun redaktas S-ro Pascoal Longo, interesan, agrablan artan produktaĵon pri la vivo de la aŭtoro de Esperanto.

Ĝi estas preparita laŭ la verko de A. Lopez Luna "Zamenhof, iniciador del Esperanto", kaj ĝian dissendon partoprenis la ludantaro de la Radistacio.

En Natal, ĉefurbo de ŝtato Rio Grande do Norte, okazis de 8 ĝis 15 Decembro esperantista semajno, sub la aŭspicioj de Associação Potiguar de Esperanto, kun la kunlaborado de Brazila Ligo Esperantista, Associação Pernambucana de Esperanto kaj Grupo Esperantista Feminino Lidia Zamenhof, de Natal.

En vasta ĉambro, ĉe centra ejo en la urbo, estis organizata impona ekspozicio, kun esperantaj libroj, revuoj, ĵurnaloj, poŝtkartoĵoj, fotografaĵoj, markoj, k.a.

Prezidis la inaŭguran ceremonion la konata klera brazila verkisto Luiz da Câmara Cascudo, kiu faris elokventan paroladon pro Esperanto. Ankaŭ ĉeestis direktoroj kaj redaktoroj de la gazetoj "A República", "O Diário da Noite", "A Ordem", "Natal Espírita". ZYB-5, Radio Poti de Natal, dissendis ĉiutage sciigojn pri la Semajno.

Dum la Semajno, la poŝtejo uzis specialan stampilon, kun vortoj en Esperanto, la verda stelo kaj la blazono de la Ŝtato.

Esperanto-Klubo, ĉe Kristana Asocio de Junuloj en Rio de Janeiro inaŭguris sian 4-an esperantistan ekspozicion. La inaŭguron ĉeestis, inter aliaj, S-roj Carlos Domingues, Ismael Gomes Braga kaj Jozefo Joels. Ĉiuj multnombraj vizitantoj tre ŝatis la esperantaĵojn ekspoziciitajn.

Aliaj esperantistaj organizaĵoj certe faris memorigajn festojn, pri kiuj ni poste sciigos.

CONSELHO FEDERAL DE COMÉRCIO EXTERIOR KAJ ESPERANTO

Conselho Federal de Comércio Exterior (Federacia Konsilantaro por Eksterlanda Komerco) interesiĝas pri Esperanto. En sia bulteno por la diskonigo de brazilaj komercaj oportunaj aferoj, sur kiu ĝi donas al la firmoj interesataj ĉiuspecajn informojn pri importado kaj eksportado, ĝi aldonis al la portugala kaj angla tekstoj, ankaŭ la esperantan tradukon.

Tio malfermis vojon por la praktika uzado de Esperanto, kaj ni gratulas la Konsilantaron.



La Ekspozicio, dum la esperantista semajno en Natal

Gramatiquices

F. BELTRANO — Pergunta-nos se é correto o vocábulo **centjaro** (= século), em vez de "jarcento", que é mais usual e lhe parece mais lógico, i.e. "jarcento = cento da jaroj". A aparente maior lógica de "jarcento" se esteia, tão somente, na regra habitual da formação das chamadas "palavras compostas", regra essa, pela qual a "palavra" principal vem sempre no fim; tal regra, que, entre parênteses, oferece exceções, está mal expressa. Antes de mais nada, não conviria continuarmos a falar em "palavras compostas" em Esperanto, à semelhança do que temos no português e em outros idiomas ("ferrovia, couve-flor"); não deveríamos falar em "composição", mas em "construção", em "formação", em "constituição" dos vocábulos na língua auxiliar; precisamos saber, mesmo desde as primeiras lições, como se "constroem" palavras, como, p.ex. "marteli", "internacia", "dubasenca", "triangulo", etc., onde não vemos "palavra" que fosse "principal". Se quisermos traduzir estes vocábulos, analisando-os, havemos de dar as seguintes primeiras traduções: "agir por meio dum martelo", "que está (ou que concerne ou que se presta, etc.) entre nações", "que tem dúbio sentido", coisa (= figura) de três ângulos". Então: "martelar", "internacional", "ambíguo", "triângulo". Vemos, pela análise, que separámos as simples "desinências" **i, a, o** do resto dos respectivos vocábulos e que exatamente para essas letras (que letras, entretanto!) se volta nossa atenção em primeiro lugar, para, de logo, dizermos se se trata de ação, de qualidade ou de objeto. Eis o que, na "construção" das palavras se define por "elemento principal", que pode, sem obrigação, nem privilégio, ser uma **palavra inteira**, como, em "legolibro", êsse elemento é "libro", como, em "jarcento" o é o substantivo "cento".

Dividindo os citados quatro vocábulos que, por método, analisamos, temos o seguinte, primeiramente: "i (= agi) per martelo", "a (= kvalita, koncerna, taŭga, estanta) inter nacioj", "a (= kvalita) je duba senco", "o (= ajo) el tri anguloj". Invertendo, para a reconstrução: "(martelo)—i, (inter nacioj)—a, (duba senco)—a, (tri anguloj)—o. Os nomes que, neste último período, encerramos entre parênteses, representam o que se chama o "elemento acessório" de cada uma daquelas palavras inteiras. Assim, a regra poderia, salvo poucas exceções, ser esta: "vem no final da palavra o elemento principal", e, conseqüentemente, por êste começamos a "análise", para fazer

a "síntese" por via inversa, como sempre.

Desta exposição concluímos, portanto, que seu vocábulo **centjaro** é perfeitamente gramatical, pois se analisa: "(cent jaroj)—o", i.e. "daŭro (o) de cent jaroj". O adjetivo qualificativo "centjara" é mais usual, sendo igual a "(cent jaroj)—a", i.e. que tem a duração de cem anos.

Haveríamos que fazer outras considerações a êste respeito, mas o espaço não nos sobra para assunto de tão alta importância e interesse.

P. C. N.

BRAZILA KRONIKO

AMAZONAS — Manáus — La Grupo Esperantista Amazonas Verda Stelo eldonis Memorigan Bultenon (Boletim Comemorativo), okaze de la festoj por memorsoleni la jarcenton de la gradaltigo de la malnova urbeto Barra al urbo, sub la nomo — Barra do Rio Negro (Enfluejo de la Nigra Rivero), la 24-an de Oktobro 1848. Nur post ok jaroj, en 1856, la nuna bela ĉefurbo ŝtata ricevis la nomon **Manaus**, omaĝe de la indigenoj **Manau**, iamaj loĝantoj de la regiono.

RIO GRANDE DO NORTE — Laŭ la paragrafo 5 de sia Statuto, Associação Potiguar de Esperanto elektis en eksterordinara ĝenerala kunsido la novan estraron: Prezidanto, Apelles Lemos, reelektita; Ĝenerala Sekretario, Luiz M. Alves; Unua Sekretario, A. Castor de Lima; Dua Sekretario, Luiz Cândido Bezerra; Kasisto, Raul Lemos; Bibliotekistino, Maria José Lemos; Direktoro de la Departamento por Kulturo kaj Propagando, Pedro Machado de Matos.

La IV Congresso Espirita do Nordeste, kunveninta en Natal, per propono de S-ro Arlindo Colaço, decidis sendi deziresprimon pri solidareco al Associação Potiguar de Esperanto.

PARAÍBA — Jen estas la nova estraro kiu direktas la Asocion Tabajara Esperanto-Klubo: Prezidanto, D-ro Manuel Tavares de Mello Cavalcante; Viceprezidanto, D-ro Claudio Lemos; Sekretarioj, S-roj Renato Lemos Diniz kaj Leônidas Paulino de Araujo; Kasisto, S-ro Leônidas Câmara; Direktoro de la Kultura kaj Amuza Departamento, S-ro Esu Flay; Direktorino de la Virina Departamento, F-ino Maria de Lourdes Barros.

STATO RIO DE JANEIRO — La Klubo Esperantista de Niterói solene

festis la unuan datrevenon de sia fonda, la 18an de Decembro.

La agrabla kunveno, kiu okazis en la Kolegio Bittencourt Silva, konsistis el salutparoladoj de la profesoro Octavio Viana Peixoto, — kaj de unu el la ĝenerantoj, Ângela de Beauclair Morais e Silva, disdono de la atestoj pri lernado, kaj pianludado, esperantaj kantoj kaj deklamado de poezioj.

SÃO PAULO — Pluraj Esperanto-Kursoj funkcias en la ŝtata ĉefurbo: tri en São Paulo Esperanta Klubo, sub la gvido de profesoroj João Masiero, Amelia Levy kaj Flávio Gouveia; en Centro Paulista de Rádio-amadores kaj Federação Espirita de São Paulo.

Santos — La gazeto "O Diário" en sia sekcio "Movimento Esperantista" aperigis serion da legindaj artikoloj pri Esperanto en Statistiko, verkitaj de nia samideano José Tito Silva.

Bauru — Por la elementa lernado de Esperanto funkcias pluraj kursoj en tiu progresanta urbo: ĉe Lernejo de SENAC, kun ĉirkaŭ 50 ĝenerantoj; ĉe la sidejoj de Spiritisma Junularo de Bauru, de Sindicato dos Contabilistas kaj de la Grupo Esperantista de Bauru.

S-ro Luiz Bartolomeu, peranto, en Brazilo, de Tutmonda Junular-Organizo (T.J.O., en Nederlando) gvidas kursojn en la kvartaloj Vila Falcão kaj Jardim Bela-Vista.

La loka radistacio PRG-8 (1210 k., endo 247 m.) disradias kurson ĉiulunde je la 21-a.

SANTA CATARINA — Bonegan verkajon pri Esperanto, kaj ĝia instruado en Florianópolis, oni legas en "Leia-me" (Legu min!), ilustrita monata revuo de Florianópolis.

— La 20-an de Decembro solene ricevis diplomojn dekunu lernantinoj kiuj finis la esperantan kurson, aranĝitan por la oficistoj de la ŝtata Departamento pri Statistiko, en Florianópolis. La ceremonio estis en la ejo de Esperantista Klubo de Florianópolis.

RIO GRANDE DO SUL — Esperanto-Rondeto de Torquato Severo en



La poŝta stampilo por la semajno en Natal

sia ordinara jarkunveno, okazinta la 20-an de Septembro, elektis la novan estraron: Prezidanto, S-ro Paulo Guilherme Neto; Vic-prezidanto, S-ro Carlos Silva Pereira; Sekr., S-ro Emilio Leol; Help-sekretario, F-ino Dilma Quadros; Kasisto, S-ro Poli Severo; Bibliotekisto, S-ro Edu P. Severo.

MATO GROSSO — La societo "Fraternidade Espírita Educandária", en la multpromesanta urbo Campo Grande, fondis la "Kolegion Zamenhof", kiu baldaŭ komencos funkcii. Apartenas al la Konsilantaro de la Societo la sindona amiko de Esperanto, Onésimo Faria.

RIO DE JANEIRO — La revuo "A Samaritana" enhavas, en sia numero Julio-Septembro, propagandan artikolon de D-ro Alberto Bonfim, pri Esperanto.

"Novideilo" estas bulteno de Laborista Esperanta Grupo Odilon Machado, kies n-on 6 ni ricevis.

Fraŭlino Yara Coelho, la kantistino kiun la esperantistoj brazilaj jam aŭdis multajn fojojn, la 9-an de oktobro donis koncerton disradiitan de la Radistacio "Jornal do Brasil". Kaj la 18-an de la sama monato ŝi donis alian koncerton de la Muzika Nacia Lernejo. Faris parton de la programoj la kantaĵo en Esperanto "Serenado", de Maria T. Bird.

Dum la Semajno de la Radio-Ginastas (Radio-Gimnastikuloj), la 15-an de oktobro nia fervora kaj klera samideanino Irani Baggi de Araujo faris interesan paroladeton disaŭdigitan de la Radistacioj "Globo" kaj Ministério de Edukado kaj Saneco, sub la temo Gimnastiko kaj Esperanto.

POLIANTEA ESPERANTISTA

La Unua Konvencio de la Esperantistoj de Minas Gerais, kiu efektiviĝis en ĉefurbo Belo Horizonte de la 25a ĝis la 29a de Novembro 1947, eldonis brosureton "Poliantea esperantista", kolekton de verkaĵoj pri Esperanto, laŭ diversaj aspektoj.

Post antaŭparolo de W.V., la verketo enhavas la oficialajn paroladojn de profesoro João Franzen de Lima, urbestro de Belo Horizonte, honora prezidanto de la Konvencio, kaj de D-ro Pedro Aguiñaldo Fulgêncio, oficiala oratoro. Sekvas: Notas sôbre o Esperanto no Estado de Minas Gerais (Notoj pri Esperanto en ŝtato Minas Gerais) A. Caetano Coutinho; Congresso Universal de Esperanto (Universala Kongreso de Esperanto), Carlos Domingues; Como estudar o Esperanto (Kiel lerni Esperanton), Porto Carreiro Neto; Vantagens do Esperanto (Avantaĝoj de Esperanto), Ismael Gomes Braga; Belo Horizonte e o Espe-

ranto (Belo Horizonte kaj Esperanto), Luiz de Azeredo Coutinho; O Esperanto, língua artificial e os idiomas naturais (Esperanto, arta lingvo kaj la naturaj idiomoj), Wilson Veado; O cinquentário (La jarkv. ndeka datreveno), Aristóteles Juvenal; Zamenhof ainda ajuda os cegos (Zamenhof helpas ankaŭ la blindulojn), Josefina Schembri; Fundação de sociedades esperantistas (Fundo de esperantista societoj), Misael Mendes; Esperanto e Cultura (Esperanto kaj Kulturo), Cicero Pereira; Correspondência em Esperanto (Korespondado esperantista), Onésimo Faria; Esperanto e a Medicina (Esperanto kaj Medicino), Francisco L. Carvalho.

ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO RIO DE JANEIRO

Em sessão de 21 de Agosto, foram eleitos membros honorários da Associação Esperantista do Rio de Janeiro, os esperantistas Ismael Gomes Braga, Carlos Domingues, A. Caetano Coutinho, L. C. Porto Carreiro Neto, Francisco Valdomiro Lorenz, J. B. de Mello e Souza e Antônio José Vaz.

Na mesma sessão, a Associação resolveu inaugurar em sua sede o retrato do inesquecível batalhador do Esperanto no Brasil — Dr. Alberto Couto Fernandes.

NEKROLOGO

Antônio Leal Costa

Kun bedaŭro ni sciigis pri la morto, en Decembro, de S-ro A. Leal Costa, Sekretario de la Ministro por Edukado kaj Saneco. Li estis simpatia al Esperanto kaj prezidis la Solenan Ferman Kunsidon de la 10a Brazila Kongreso de Esperanto, en Aŭgusto 1945, kaj kiel reprezentanto de la Ministro, S-ro Leal Costa faris saĝajn konsideradojn pri la Kongreso kaj la venko de Esperanto.

PITAGORA CENTRO

Per letero, datita je la 15-a de marto ĉijara, de la Direktoro de la "Colônia Pitágoras do Instituto Néo-Pitágorico" (Pitagoro-Centro de la Novpitagora Instituto), Brazila Ligo Esperantista estis informita pri la inaŭguro, en tiu centro, de Esperanto-kurso, gvidata de Prof-ro Octavio Peixoto, kiu sukcesis entuziasmigi siajn lernantojn pri nia helpa lingvo. Efektive, la "pitagoranoj" en la Federaĵa Distrikto kaj en Niterói, ĉefurbo de ŝtato Rio de Janeiro, jam de longe batalas por la tutmonda frateco; nun, laŭ la citita informo ili sentas en Esperanto novan eron

de la longa ĉeno, kiu iam ligos inter si ĉiujn homojn. Estas do espereble, ke novajn samideanojn ni baldaŭ havos — fervorajn kaj konsciajn pri la alta valoro de la idiomo, kiu veré kunigas la homojn por la Paco sur nia tiel malkvieta planedo.

EKSLIBRISOJ

S-ro D-ro Paulo José Pires Brandão, prezidanto de S.A.B.E.L. (Societo de Brazilaj Amatoroj de Ekslibrisoj), donacis al ni la unuan numeron de la bulteno de tiu societo, kiu enhavas interesajn artikolojn pri ekslibrisoj. Kiel sciante, ekslibriso estas surskribo aŭ bildo, kiun tu surmetas sur la libroj de ŝia biblioteko, por montri, ke ili estas lia propraĵo. D-ro Pires Brandão parolis al ni pri la granda taŭgeco de Esperanto por ekslibrisoj, kaj pri la oportuneco disvastigi ĝian uzadon en tiu kampo. La intercsatoj pri la temo skribu al Sociedade de Amadores Brasileiros de Ex-Libris, Rua Araujo Porto Alegre, 70, salas 211-214, Rio de Janeiro, Brasil.

COLEÇÃO DE PERIÓDICOS

A catalogação das revistas e demais periódicos colecionados pela L.E.B., serviço que fora há tempos empreendido pela saudosa D. Elisabeth Bloomfield e por D. Irani B. de Araújo, mas que por motivo das mudanças de sede não pudera ser concluído, foi agora terminado pelo Secretário Sr. Francisco Ferreira da Costa Filho, que organizou um fichário completo da coleção e apresentou um interessante resumo estatístico.

Dêsse valioso trabalho se verifica que a coleção compreende 683 periódicos, publicados de 1898 até esta data e editados nos 53 países seguintes: — Africa do Sul 2, Alemanha 72, Argélia 2, Argentina 9, Austrália 7, Austria 28, Bélgica 22, Brasil 22, Bulgária 9, Canadá 1, Checoslováquia 15, Chile 4, China 16, Colômbia 1, Coreia 2, Cuba 3, Dinamarca 8, Egito 2, Escócia 1, Eslováquia 1, Espanha 26, Estados Unidos 26, Estônia 2, Filipinas 1, Finlândia 10, França 104, Grécia 2, Holanda 32, Hungria 26, Índia 1, Índia Holandesa 2, Inglaterra 23, Irlanda 1, Islândia 1, Itália 18, Japão 35, Jugoslávia 12, Lituânia 1, Marrocos 2, México 8, Noruega 4, Nova Zelândia 3, Palestina 1, Peru 1, Polónia 13, Portugal 12, Romênia 6, Rússia 22, Suécia 25, Suíça 21, Transval 1, Turquia 2, Uruguai 2.

Dos periódicos ainda publicados em 1947, os mais antigos são "Amerika Esperantisto", "British Esperantist", "Espero Katolika", "Franca Esperantisto", "Hungara Esperantisto", "Pola Esperantisto", "Svenska Esperanto-Tidningen" e o nosso O BRASIL ESPERANTISTA.

A Liga, na medida do possível, mandará encadernar a coleção, cuja consulta será, de certo, um prazer para os samideanos que nos visitarem.

O 33.º Congresso Universal de Esperanto

Dêste Congresso, realizado em Malmö, Suécia, de 31 de Julho a 7 de Agosto, não podiam ser melhores as notícias publicadas nas revistas esperantistas da Europa: sucesso brilhante, colaboração harmoniosa, alegres excursões e festas, *Somera Universitato* com uma série de preleções e conferências, trabalhos de resultados auspiciosos — enfim, um Congresso "não só internacional e universal, mas também verdadeiramente esperantista".

Não obstante as dificuldades opostas por alguns países em relação a passaportes, vistos e divisas, apresentaram-se em Malmö, dentre quase 2.000 esperantistas inscritos, 1.800 congressistas, de 33 países.

No *Kongresejo*, onde se encontravam e trocavam cumprimentos antigos e novos esperantistas, cada um recebia um pacotinho com diversos documentos, entre os quais o distintivo de congressista, que dava direito a transporte gratuito em todos os bondes e ônibus que trafegam pela cidade.

No dia 31 houve a sessão solene de abertura, no grande salão do Teatro Municipal de Malmö. No fundo da sala ostentava-se o gigantesco estandarte verde do Esperanto, vindo de Berna.

Após o hino *La Espero*, e o Sr. Wilhelm Johansson ter declamado um prólogo alusivo ao Congresso, o Sr. Jan Stronne, presidente da Sveda Esperantista Federacio e do L.K.K. (Loka Kongresa Komitato), o principal organizador do Congresso, leu um telegrama do Primeiro Ministro do Governo Suéco, Tage Erlander. Saudou ainda o Congresso o Sr. Emil Olsson, presidente da Assembléa Municipal de Malmö.

O Sr. E. Malmgren, presidente de U. E. A., agradeceu aos Governos do país e do Município, à Comissão preparadora e aos esperantistas que compareceram.

Foi eleita a mesa do Congresso: Jan Stronne, presidente; O. C. Goldsmith, secretário geral; O. T. Nicolaisen, vice-secretário.

Depois de falar o presidente, fizeram saudações os representantes oficiais dos Governos e os das organizações esperantistas. Falou, também, o jovem Ludoviko Zamenhof, representando a família Zamenhof.

Durante o Congresso celebraram-se os tradicionais serviços religiosos (católicos e protestantes) e fotografaram-se em grupo os esperantistas no anfiteatro da praça de esportes.

Foram inúmeras as excursões e visitas, pela cidade e arredores, a museus, castelos, lugares históricos.

A par das diversões, filmes, danças, houve, também, muito trabalho.

O Komitato de U. E. A. reuniu-se durante três horas, cada dia, tratando de assuntos de grande monta: — declarações à UNO; serviços de UFA *relas de agitoj*; maneira de

pagamento de cotizações em alguns países; introdução do ensino do Esperanto nas escolas; cursos de verão; publicação de importante obra sobre a língua internacional, feita pelo professor Pierre Bouet para o Instituto J. J. Rousseau, de Genebra; e principalmente, criação de um centro de propaganda, cujo chefe seria o Sr. Stronne, presidente do Congresso.

O Sr. E. Durrant, de Londres, representante de UEA, apresentou minucioso relatório, do qual se evidencia que UNESCO está pronta a estudar objetivamente as qualidades do Esperanto, como língua internacional.

Merecem nota especial as conferências e preleções de *Somera Universitato*, em que tomaram parte, entre outros, os professores Collinder, Lunderark, P. Rosetti, Stop. Bowitz, Drs. P. Neergard, F. Szilágyi, V. Setälä, S. Stahre.

Ficou resolvido editar-se um livro contendo todas as conferências e preleções feitas durante o Congresso.

Reuniram-se em sessões especializadas, cujo resultado foi dado na sessão de encerramento, diversas associações, entre elas: Internacia Scienca Asocio Esperantista (I. S. A. E.), que pretende em breve iniciar a publicação de seu órgão *Scienca Revuo*; Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (T. E. K. A.), que está organizando um *adresar*o de esperantistas médicos, farmacêuticos, enfermeiros, etc.; *Universala Ligo* (U. L.); Internacia Instruista Kunlaboro (I. I. K.); Internacia Koopera Esperantista Ligo (I. K. E. L.); Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I. K. U. E.); Tutmonda Esperantista Journalista Asocio (T. E. J. A.).

Na sessão de encerramento, a 7 de Agosto, o Congresso aprovou importante resolução do Komitato de U. E. A., apresentada à sessão pelo Dr. Lapenna.

Eis seu texto completo:

"O 33.º Congresso Universal de Esperanto, realizado de 31 de Julho a 7 de Agosto, em Malmö, no qual tomaram parte 1.800 representantes de 33 países, reconhece:

1. — que o progresso de forças materiais de ciência e recursos técnicos sempre cada vez mais põe em contato, direta ou indiretamente, os homens das diversas nações, e por isso continuamente se faz sentir mais e mais a necessidade de uma língua internacional, neutra e fácil, aplicável a todos os campos da vida internacional moderna:

2. — que, a despeito dos obstáculos de diversas espécies, opostos às relações internacionais, e principalmente das duas grandes guerras, que destruíram as bases da solidariedade internacional, a Língua Internacional Esperanto progrediu e propagou-se constantemente, tendo hoje rica literatura científica e letrada, número-a imprensa e aplicação

prática nos mais variados ramos da vida quotidiana, tornando-se destarte não somente língua escrita, mas também língua viva, correntemente falada por centenas de milhares de homens, em todas as partes do mundo.

3. — que todos estes consideráveis resultados foram alcançados até agora, quase exclusivamente pelo trabalho e dedicação individuais, sem apoio oficial dos governos ou das instituições internacionais e interestatais.

Em consequência, o Congresso resolve:

1. — Recomendar a todas as pessoas que falam a língua internacional e a todas as organizações para sua divulgação, intensificar seu trabalho, notadamente entre a mocidade e o professorado de todo o mundo;

2. — Expressar seus agradecimentos a todas as estações de rádio, que usam a língua internacional em irradiações, e à imprensa mundial favorável ao Esperanto;

3. — Pedir aos Governos dos diversos países considerarem seriamente as possibilidades de introdução da língua internacional nas escolas e nos cursos de professorado, como disciplina normal ou facultativa, auxiliando deste modo a educação das novas gerações com o espírito de tolerância e de respeito às outras nações;

4. — chamar a atenção de todas as organizações internacionais, e particularmente da UNO, para a língua internacional, não só como necessário, e por todos os aspectos, perfeito instrumento técnico de comunicação para a permanência espiritual de idéias (rádio, reuniões, conferências, congressos, filmes, ciência, arte, etc.), mas também como poderoso meio de aproximação dos povos, e consequentemente, ainda, para estimular uma justa e duradoura paz mundial."

O Sr. Malmgren fez a exposição dos trabalhos do Komitato e da mesa do Congresso, alguns dos quais já citámos atrás.

Seguiram-se as palavras de agradecimento aos congressistas, e a todos que de qualquer modo concorreram para o brilho do Congresso. Cantou-se o hino esperantista, e após um grande viva ao Esperanto proposto pelo Sr. Malmgren, o grande estandarte verde foi descido e entregue ao Sr. Goldsmith, representante do país onde se realizará o futuro Congresso.

Assim terminou, segundo as palavras de "La Espero", da Suécia, "la sukcesa, brila, bone organizita, laborplena, instruica, ekskursu, rezultodona, senkverela kaj harmonia" 33.º Congresso Universal de Esperanto.

O 34.º Congresso deverá ser em Bournemouth, Inglaterra, de 6 a 13 de Agosto de 1949. Por motivos técnicos ficou decidido que poderão inscrever-se, no máximo, 2.000 pessoas, só sendo aceitos pedidos de inscrição até 30 de Junho.

Recenzo

ESPERANTO — The World Interlanguage (Esperanto — La Tutmonda Interlingvo), de George Alan Connor Doris Tappan Connor, William Solzbacher, The Very Rev. Dr. J. B. Se-Tsien Kao. I vol. 18 x 13 cm., 246 pĝ. Eldonita de Beechhurst Press, New York. Tolbindita, prezo en la Libroservo de B.L.F. Cr\$ 60,00.



Cartão-postal dirigido ao representante da Ligu, durante o 33.º Congresso, por seus cobegas do Komitato: E. Malmgren, C. C. Goldsmith, A. C. Oliver, E. Dahl, F. Weeke, J. Stenström, O. Bünnemann, D. Kennedy, W. Laederach, J. D. Sayers, J. Guillaume, St. Fink Jensen, R. Bugge - Paulsen, Dr. Lapenna, V. Setälä, E. Adamson. — Vê-se o carimbo postal comemorativo.

Brazilo Kiel Pioniro

En 1940 unuafaje aperis la "Statistika Resumo pri Brazilo", eldonita de la Grafika Servo de l' Instituto Brazila de Geografio kaj Statistikado en Rio de Janeiro, en la lingvoj portugala kaj angla. La dua eldono, kiu ĵus elvenis kun la statistikaj resumoj pri la jaroj 1940-1945, aldonis al la du lingvoj kiel trian -- Esperanton. Per ĉi tiu kurajo aplikado de la internacia lingvo, je sama mezuro kiel la enlanda (portugala) kaj la angla, Brazilo -- per sia Geografia-Statistika Instituto -- unu plian fojon sin provas kiel pioniro.

Temas pri ampleksa volumo (267 paĝoj, 18,5 x 27 cm), bonege presita sur bonega papero, eldonita sub la titolo "Sinopse Estatística do Brasil — Statistical Abstract of Brazil — Statistika Resumo pri Brazilo 1946". La libro konsistas el geografia karto de Brazilo kun ĝiaj (28) federaciaj unuoj (ŝtatoj) kaj ties ĉefurboj, dediĉo al la Internaciaj Kongresoj de Statistiko (Washington 1947), antaŭparolo, enhavregistro kaj amaso da statistikaj tabeloj pri la situacio de Brazilo sur ĉiuj kampoj de homa agado, ĉio publikigita en la nomitaj tri lingvoj. Do, ĝi estas scienca verko de eminenta graveco.

Okulfrapa estas, laŭ ĉi tiuj statistikoj, la progreso de Brazilo sur ĉiuj kampoj. La loĝantaro plimultiĝis de iom pli ol 14 milionoj en 1890 al pli ol 41 milionoj en 1940, kaj pli ol 46 milionoj en 1945: la brutoj de 3.758.228 en 1939 al 5.219.931 en 1945. La kulturita areo (ĉefe maizo, koton, kafe, rizo, fazeolo, manioko kaj sukercano) kreskis de 13.839.472 hektaroj en 1939 al 14.802.436 en 1944. La valoro de produktataĵoj de 8.192.838 kruzeroj en 1939 al pli ol la duoblo en 1944. Kaj tiel oni povas trovi statistikojn pri transporto,

mono, komerco, salafroj, socialaj kaj kulturaj institucioj ktp.

La eldoninta instituto esprimas la deziron, ke la Statistika Resumo "estu plia alproksimilo inter Brazilo kaj la ceteraj nacioj", kaj tio estas unu plia motivo, kial ĝi decidis apliki en ĝi Esperanton apud la lingvoj enlanda kaj angla.

Niaj samideanoj vaste utiligu la fakton de la eldono de l' nomita libro, por propagandi ĝin kaj per ĝi, precipo en sciencistaj rondoj. La Statistika Resumo estas konvinka pruvo pri la aplikeblo de Esperanto. Al Brazilo kaj ĝia Geografia kaj Statistika Instituto gratulon pro ĝia pionita agado!"

(El "Heroldo de Esperanto". Scheveningen, Ned., N-ro 13 (1091), 5 Aŭgusto 1948).

BIBLIOGRAFIO

Deutsch-Esperanto-Taschenwoerterbuch, 2. durchgeschene Auflage (Germana-Esperanta Poŝvortaro. 2-a Eldono reviziita). 192-paĝa volumo, 11,8x8,3 cm., kompilita de J. Kuehnel, presita de Stader Zeitungs- und Verlags-Druckerei, en Hamburg. Prezo ne montrita.

Dank'al lerta ŝparado de papero per densa kompostado, en ĉi tiu malgranda volumo aperas preskaŭ 10.000 germanaj vortoj, t.e., la tuta lingvo por komuna uzado. La unua eldono aperis en 1947 kaj la 2-a en 1948. La traduko de ĉiu germana vorto estas tre klara, en perfekta Esperanto, kaj montras gisfundan posedon de ambaŭ lingvoj.

Preseraroj preskaŭ tute ne estas. Ni efektive rimarkis nur unu: kompostaĵo de tuta vorto falis sur la suban linion kaj donis ĉi tiun strangajon: "zymisch cinika ĉapelo"; tiu ĉapelo apartenas al la supra linio, kiu devus

Elkore ni bonvenigas ĉi tiun belan kaj plej inteligente preparitan volumon, kiu espereble estos modelo por similaj kunigaĵoj de diversaj libroj en unu. La volumo ja enhavas ses librojn en unu kovrilo, nome: 1. Klarigo pri la mondlingva problemoj kaj la celo de Esperanto. 2. Plena lernolibro de Esperanto por anglalingvanoj. 3. Esperanta Legolibro. 4. Gvidlibro por praktika esperantisto. 5. Esperanta-Angla Vortaro. 6. Angla-Esperanta Vortaro.

La lernolibro estas tre praktika kaj instruas ĉefe konversacion. Ne estas preseraroj kaj la eminentaj Aŭtoroj faris nur unu troan streketon en la tuta verko, laŭ mia esploro: en la paĝo 42-a ili presigis: dek-unu, dek-du, dek-tri, dudek-unu, anstataŭ: dek unu, dek du, dek tri, dudek unu; sed tiu erareto estas tiel disvastigita, ke oni preskaŭ ne atentis ĝin.

La nomoj de la Aŭtoroj estas tre estimataj en la tuta Esperantujo pro ilia brila agado. Mi nur memorigu, ke unu estas ĉino, unu germano, kaj du usonanoj.

Por atentigi la lernanton pri la regula derivado en Esperanto, kiel aglutina lingvo, en la Esperanta-Angla Vortaro la radiko estas apartigita de la finigo per streketo. Kvankam nun jam ne estas tre uzata tiu aranĝo, ĝi estas tamen tre konsilinda, ĉar novico emas forgesi tiun mirindan regulecon de Esperanto pro la nereguleco de naciaj lingvoj.

La instruado de la ses participoj de Esperanto, ja malfacilaj por anglalingvano (se ne por ĉiuj!), estas tre facile solvita per ekzemploj sen tradukoj kaj la konsilo, ke la lernanto ne provu traduki, sed pensu rekte en Esperanto, ĉar tiel li ne povos erari!

Se la distribuado de tiu bonega volumo estos lerte farata, nia movado multe plivigliĝos per ĝi en la vasta anglalingva mondo.

Igobo.

esti: "Zylinderhut cilindra ĉapelo", sed la "ĉapelo"... falis.

Tre utila libreto, ne nur por germanoj, sed por tiuj esperantistoj de ĉiuj lingvoj, kiuj

legas la germanan kaj bezonas oportunan, modernan poŝvortaron.

La plej grava signifo de tiu libreto estas tute morala: post 12-jara persekutado al niaj ingvo kaj ideo, Esperanto fine povas denove esti presata en Germanujo! Ĝi estas la unua libro, kiun ni ricevis el Germanujo post la nazla regado. En la antaŭparolo la kompilinto diras: "En la germana Patrujo bonaj Esperanto-Vortaroj estas nun maloftegaj, ĉar de la jaro 1933 ĝis 1945 estis senindulge bruligitaj ĉiuj tiaspecaj libroj trovitaj".

Niaj samideanoj jam povas denove labori por Esperanto en Germanujo. La unua postmilita Kongreso de germanaj esperantistoj jam brile montris, ke ilia fervoro postvivis la longan subpremado. Komenciĝas por ili Nova Epoko. Baldaŭ ili reakifos en nia movado la elstaran lokon, kiun ili okupadis ĝis 1932.

I. G. B.

Zamenhof — *Iniciador del Esperanto*, de A. López Luna. Ediciones Vertiente Casilla Correo 2507, Buenos Aires, 175 paĝo — 1948.

Interesan verkon, kiun oni legas plezure, skribis S-ro López Luna, pri la vivo de la aŭtoro de Esperanto.

Li profitis ĉion kion oni ŝcias pri nia Maŝtro, liaj gepatroj kaj gefratoj, por agrable priskribi ilian vivadon, eble iom romanece kun dialogoj tre naturaj, bone verkitaĵ.

Tiel intime estas ligata la Zamenhova vivo al ĝia kreaĵo, ke nepre estis paralele priskribita en ĉi tiu verko la historio de Esperanto.

Vivo de Nansen kaj La Portugala Literatura. De Agostinho da Silva — El la portugala lingvo tradukis Eduardo da Motta Padrao (1a) kaj Manuel de Freitas (2a).

Du novaj libretoj el la serio "Enkonduko en Kulturon", eldono de Portugala Eldona Bando.

La kortuŝa, vigla kaj modela vivo de Nansen estas bone priskribita de la aŭtoro.

En *La Portugala Literatura* la aŭtoro komencas kun la unuaj poetoj en la 12a. jarcento, konigas al la legantoj la nombrajn verkistojn de la 16a. ĝis la 19a. jarcento.

Brazilajn verkistojn eĉ famkonatajn kiuj skribis en la portugala lingvo, la aŭtoro ne citis.

Ni rimarkas ke la traduko donas la nomon de la verko de Junqueiro — "A morte de Dom João" kiel "La morto de reĝo Johano". Devas esti "La morto de Dom Juan Tenório". La verko ne temas pri la reĝo, sed pri la hispana heroo de legendo, persono de la tragedio *Stona gasto*, de Puŝkin, esperante tradukita de N. Borovko, kaj de la kvinakta komedio *Don Juan aŭ la Stona Festeno*, de Molière, esperante tradukita de la eminenta Émile Boirac.

"O BRASIL ESPERANTISTA"

Precisando do número de Abril-Junho de 1946 de "O BRASIL ESPERANTISTA", ficaremos muito agrade-

cidos ao leitor que, podendo dispor dêle, no-lo queira remeter.

Aceitamos, outrossim, exemplares de quaisquer outras edições atrasadas, para os quais há sempre procura.

21. CONGRESSO DE S. A. T.

O 21.º Congresso de SAT, realizado em Amsterdam, ao mesmo tempo que o 33.º Congresso Universal de Esperanto, em Malmö, foi o maior, até agora organizado por SAT. Teve 1.450 aderentes de 10 países. Foi cumprido o magnífico programa, de trabalho, de preleções (Laborista Universitato), de diversões e excursões.

O Congresso de 1949 será em Paris.

CONCURSO ENTRE OS GRUPOS

Retificamos a maneira de contar os pontos no concurso anunciado em nosso último número, a saber: AM — 2; MJ — 4; MA — 8; MS — 20. Com essa correção não se alteram as condições do concurso.

Pedimos a atenção dos sócios para o concurso, também promovido por U. E. A. entre as associações nacionais, e os convidamos cordialmente a cooperar para que a nossa Liga obtenha uma boa classificação nesse torneio internacional.

D-RO BAGGI DE ARAUJO

La 24-an de Oktobro pasis la jarcento de la naskiĝo de D-ro Jácome Martins Baggi de Araujo, ĵuĝisto, kiu estis la plej malnova brazila esperantisto.

La estraro de B.L.E., omaĝante lian memoron, vizitis lian tombon, en la tombejo São João Batista.

NOVAJ PROFESOROJ DE ESPERANTO

Inter la esperantistoj, kiuj lastatempe ricevis la diplomon liveritan de Brazila Ligo Esperantista, estas tri konataj samideanoj: S-ro Allan Kardec Costa, oficisto ĉe la Banco do Brasil, en Belo-Horizonte; D-ro Wilson Veado, advokato kaj ĵurnalisto en Belo-Horizonte; kaj la eminenta Pastro Jozefo Nogueira Machado, S. J., kiu venis el Stato Rio Grande do Sul, por fari la ekzamenon ĉe la sidejo de Brazila Ligo Esperantista, laŭ li deziris.

CURSO DE ESPERANTO

por A. COUTO FERNANDES
e H. MOTA MENDES

4ª edição refundida

Gramática — Exercícios — Leituras

CR\$ 12,00 O EXEMPLAR

Desconto para os grupos que encomendarem 10 ou mais exemplares, 20%.

LIVROS EM E SOBRE ESPERANTO

	Cr\$
Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo, broch. Cr\$ 20,00, cart. Cr\$ 35,00, enc.	60,00
Dicionário Port.-Esp. compilado por A. Couto Fernandes, Carlos Domingues e L. Porto Carreiro Neto, cart. Cr\$ 35,00, enc.	40,00
Dicionário Esp.-Port., por A. Couto Fernandes e Carlos Domingues, enc.	25,00
Dicionário de Bolso Esp.-Port., por A. Couto Fernandes, broch.	8,00
Método de Esperanto, compilado por Ismael Gomes Braga	7,00
Esperanto, Modelo, compilado por Ismael Gomes Braga	8,00
Chave de Esperanto, uma Cr\$ 1,00 — dúzia	10,00
Curso Elementar de Esperanto, por Saldanha Carreira e Luzo Bemaldo Karlo, por Edmond Privat	3,00
Esperanto (Série Pedro II — Coleção B) — Caderno para o ensino prático do Esperanto, um Cr\$ 3,00 — dúzia	25,00
Armea Terminaro, Aeronáutica Terminaro e Terminaro por Infanludoj, cada um Cr\$ 3,00 — coleção	8,00
Monumento de Carlo Bourlet, broch.	5,00
Veterano?, por Ismael Gomes Braga, broch. Cr\$ 7,00, etc.	10,00
La Vidvino, por José de Alencar, traduzido por L. Porto Carreiro Neto	6,00
Ama Stelaro, por "La Forgesito"	5,00
Santos Dumont — La Aerpioniro, por Alexandre Brigole, traduzido por Maria do Amaral Malheiro	5,00
La Espero, hino esperantista, com música para piano	3,00

Encomendas à BRAZILA LIGO ESPERANTISTA — Praça da República, 54, RIO DE JANEIRO. As importâncias inferiores a Cr\$ 20,00 devem ser acrescidas de 10% para o porte e registro.

Curso por correspondência, elementar Cr\$ 40,00, superior